# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 10/03/2022 Kvincentsepdektria eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro*

*lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu *Google Translate* kiel vortaron**

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★


**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Entute 766,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas 293,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas 193,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas 174,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas 106,000 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2022)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondas pri via sano, do portu maskojn. *Roger Springer*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★



la esperanta retradio
Donas Bonan Cirkaŭ-5 Minutan Aŭskultadon kaj Legadon Ĉiun Tagon. 5-3-2022



REKRESKAS HAROJ SUR KALVA HAŬTO

## KIEL SCII? TERRY MANLEY

Mi dankas al Roger pro la ŝanco doni ian ajn opinion en ĉi tiu bulteno. Li ne cenzuras artikolojn eĉ se tiuj kontraŭas liajn vidpunktojn. Kaj ni devas memori ke la opinioj estas individuaj -ne ĝenerale la vidpunktoj de Esperantistoj aŭstraliaj.

Ĉi tiu bulteno estas la iniciato de Roger je krizepoko en la aŭstralia movado. Plej multaj el ni preferas forgesi pri tia periodo. En tiu periodo la estraro de AEA provis cenzuri la enhavon de Esperanto sub la Suda Kruco. Rezulte Donald Broadribb, la tre kapabla kaj longdaŭra redaktoro, eksigis sin el tiu posteno. Roger Springer deziris ke aŭstraliaj Esperantistoj havu kontaktilon sen tiuj limigoj. Do jen la bulteno.

De tempo al tempo leviĝas malakordo pri artikoloj. Roger daŭre petas kontribuojn. Do ĉiuj havas ŝancon doni siajn opiniojn.

Por mi estas ege malfacile deĉifri la veron el la amaso da informo (aŭ misinformo!) en ĉi tiu informiga epoko. Ĉu oni emas klini al opinioj kiuj plaĉas al oni sen konsidero pri tiuj kiuj ne plaĉas al oni? Ĉu oni nur akceptu la informon de la ĉefaj amaskomunikiloj kaj registaro? Almenaŭ la debato instigis min iom plu esplori. Ial, iel mi estis gvidata al retpaĝo sekva. Plej eble roboto fakte gvidis min tien. Do jen alia problemo ĉar, tiel kaj tial oni emas legi artikolojn samspecajn kaj ne diversspecajn.

Sed jen mia kontribuo, kaj memoru ke ĉi tiu ligilo ne cent-el-cente reprezentas mian vidpunkton sed aldonas, al mia scio- se mi akceptus ke la informo estus ĝusta.

La prelego en la ligilo estas de Septembro 2015
*John J. Mearsheimer, the R. Wendell Harrison Distinguished Service Professor in Political Science and Co-director of the Program on International Security Policy at the University of Chicago.*



https://www.youtube.com/watch?v=JrMiSQAGOS4 *Terry Manly*

## Ĉesu la malprudentan kuregon al nuklea milito!

Stop the reckless spiral toward nuclear war! - World Socialist Web Site (wsws.org)

*Roger Springer*

(*Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*

**EKSTRAÎOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).**

**Numero 5 de "Por Progresantoj".**



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Kion oni devas fari se oni volas uzi pli ol unu gramatikajn subjektojn aŭ objektojn en unu propozicio?

2). Se vi volas trransformi aktivvoĉan frazon al sia pasivvoĉa frazo, kiujn frazpartojn vi rajtas ellasi?

3). Kio estas la signifodiferenco inter aglutina kunmetaĵo kaj prepozitiva kombinaĵo?

4). Se vi volas aŭ devas transformi pasivvoĉan propozicion al sia aktivvoĉa formo, kiuj frazpartoj devas ŝanĝiĝi?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 573. *Marcel Leereveld.*




## Antaŭa Melburna Esperanto-domo

Laŭ mia iom supraĵa tralegado ĝis la noktomezo melburnaj esperantistoj posedis la propran E-domon, 10 The Crofts, Richmond ĝis proksimume 1988 kiam ĝi vendiĝis kontraŭ proksimume $250,000. https://www.realestate.com.au/property/10-the-crofts-richmond-vic-3121 )

Kiom proksimume kostus aĉeti la saman nemoveblaĵon en la nuno? Ĉu ĝi nun alproksimiĝas al unu kaj duono milionoj kaj en ĉiu monato eĉ pli altiĝas?

Mankas en tiu kroniko tamen informoj pri kiel kaj kiamaniere oni havigis la financajn rimedojn por aĉeti Esperanto-domojn respektive en Melburno & Sidnejo.

**Ĉu legiĝas ie tiu historio?** Amike *Paulo Desailly*



PS. Eble vi ne scias, ke la Komitato de UEA kune kun la estraro probable vendos la Centran Oficejon en Roterdamo en la unua duono de 2022.

Aldona novaĵo. La decido definitive vendi la Centran Oficejon jam okazis antaŭ proksimume unu monato.



## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.

Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.

La 5a de marto estis la unua sabato Venis Roger, John kaj Ian. La aŭto de Chris jam dronis en inunda vojo kaj ŝi devos aĉeti alian aŭton. Ŝi pardon petis kaj ne povis veni. *Roger Springer*

# la plej grandega ekspozicio de rusaj popolmuzikiloj

Por montri, ke ne ĉiuj homoj estas rusmalamantoj, mi petas vin publikigi la sekvantan raporton pri io, kio okazis en la Rusa Domo en Adelajdo la 28-an de Junio, 2015.

La 28-an de Junio, 2015 okazis la plej grandega ekspozicio de rusaj popolmuzikiloj en la suda hemisfero. Neniam antaŭe okazis io simila en tiu ĉi nia lando.



Laŭlonge de du grandaj muregoj videblis multege da balalajkoj. 4 subkontrabasbalalajkoj, 5 basbalalajkoj, 4 aldbalalajkoj, 2 malgrandaj balalajketoj por infanoj, proksimume 20 primbalalajkoj kaj multaj historiaj kopioj.

Krome videblis 3- kaj 4-kordaj domroj: 4 basdomroj, 5 alddomroj, 6 primdomroj, aŭtoharpo, baglamaso, bandura, bajano, liutoj, mandolinoj, tamburitsoj kaj multaj interesas muzikiloj, kies nomon eĉ mi ne povas traduki, ĉar mi neniam antaŭe vidis aŭ aŭdis pri ili.

Estis metitaj du grandegaj paroliloj sur la straton ekster la Rusa Domo por ke la preterpasantoj povu aŭdi la belegan muzikon venantan el la domo.
Apud la laŭtparoliloj staris granda subkontrabasbalalajko por altiri la atenton de la publiko. Multaj eniris, kaj fakte multaj interesatoj devis stari, ĉar la halo ne estis sufiĉe grandega por ke ĉiu povu sidi.

Infanoj dancis, ludis kaj kantis la belegajn rusajn kaj ukrainajn popolkantojn. Du el la plej lertaj balalajkistoj en Aŭstralio ludis en la orkestro de plenkreskuloj. Estis belega travivaĵo vidi kaj aŭdi tiom da eĉ tre belegaj sonoj donantaj emociojn foje ĝojan kaj foje malĝojajn kaj sentimentajn.

Mi parolis kun multaj el la ĉeestantoj. Kompreneble multaj estis rusoj kaj ukrainoj. En la rusa domo en Adelajdo oni bonvenigas ĉiujn. Oni ne kverelas tie, oni ĝuas la ĉeestadon unu de la aliaj.

Estis japanoj, germanoj, skotoj, irlandanoj, angloj, eĉ aŭstralianoj, kanadanoj ktp. Supozeble ĉiu nacio estis reprezentata. Eĉ iu Granda Dano ĉeestis. Dum la plej multaj vizitis la rusan manĝejon la Granda Dano trinkis tason da kafo, fakte li trinkis du tasojn da kafo, kun sukero kaj lakto!


Do, malgraŭ la opinioj de multaj, facile eblas ke la homaro vivu pace kaj harmonie kune, ĉu ne? Kvankam la komuna lingvo estis la angla, oni tamen sufiĉe bone interkompreniĝis. Mi vidis nur gajajn vizaĝojn kaj ridetojn!

Imagu la ĝojon kiam ni ĉiuj parolos la Neŭtralan Lingvon Esperanton! Jes, povas esti neniu dubo pri tio, ke ankaŭ muziko estas internacia lingvo!!! *Bob Felby*



**La okcidento estas klare decidita heroe batali kontraŭ Rusio ĝis la lasta ukraino.**
Rusio volas ĉesigi ĉi tiun operacion kiel eble plej baldaŭ, sed nur post kiam ĝiaj duoblaj celoj de 1) malarmado kaj 2) denaziigo estas atingitaj.
[Day 11 – Putin's last warning before beginning of the 2nd phase of the operation – The Greanville Post]

# RE: Falsa novaĵo en 'Aŭstraliaj Esperantistoj'




Estimata Roger!
Ankaŭ mi estas pacifisto: tial mi estas esperantisto. Sed mi ne volas, ke esperantistoj dissendu malveran informon pri militoj ie ajn, kaŭze de troa kredemo. Bonvolu dissendu ĉi-tiun ligilon al la legantaro de 'Australiaj Esperantistoj', por ke ili povu decidi por si mem. Gravas, ke AE ne dissendu malveraĵojn.
Bonvolu legi chi tiun:
https://www.snopes.com/news/2022/02/24/us-biolabs-ukraine-russia/
Salutas vin, *Margaret Furness*, Adelajdo

Mi ne vidis kontraŭan informon kiam mi fuŝe(?) serĉis antaŭ ol mi montris la mapon en AE572, alie mi ne uzus la mapon. Mi pardon petas.

Ĉiuj mensogas dum milito, kiam ili sendas sian popolon aŭ armilojn por mortigi la alian.
Mi ĉiam montras la ligon al originalaj informantoj
Amike *Roger Springer*

*https://www.globaltimes.cn/special-coverage/Ukraine-Tensions-Timeline.html*
kaj por la historio de la situacio https://www.greanvillepost.com/ *Roger Springer*

**Kion vi ne scias pri la milito en Ukrainujo** *https://youtu.be/OisJkpGYpAo*



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*

**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:**
1). Oni devas uzi konjunkciojn inter la samaj frazpartoj.
2). Neniun. Notu ke mi uzis "al SIA pasivvoĉa" ne "al IU pasivvoĉa".
3). La aglutina aldonas la signifon "speciala".
4). A) La Subjekto ŝanĝiĝas al Objekto.
B) La verbo perdas la sufikson "-at-".
C) La Adjekto kun "de" fariĝas la Subjekto (sen "de"). *Marcel Leereveld.*

# Ĉu Soldato estas ŝakpeono (kanonfuraĝo) kaj ne Homa?

Plej ofte oni soldatiĝis pro la pago kaj ne pro la emocio mortigi aliajn homojn.
Aŭ ĉar la ŝtato bezonas kanonfuraĝulojn por protekti la nunan parlamentaran sistemon
Kion vi opinias. Skribu al AE! *Roger Springer*

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917



# Faktoj de la historio de mia vivo. (8)

Holando estas lando de kanaloj kaj kanaletoj, kiuj kune fluigas la troan akvon al kaj en la Nordan Maron. La kanaletoj ĉirkaŭas la pli profundajn landpecojn, nomatajn "poldroj" (*polders*) kies grundo estas tre fekunda ĉar antaŭe estis riverdelto. Oni ne bezonas sterkon, kaj ofte kreskigas tie herbon por nutri la bovinojn sur ĝi. La pli altaj kanaloj, kun flankaj vojoj, sendas la akvon pli alten al la maro. Trafiko estas sur la vojoj kaj sur la kanaloj. Ĉe la Norda Maro, apud Hago, estas granda maŝino kiu tage kaj nokte maren pompas la akvon, por ke la holandanoj povu vivi en la submarnivela lando. Ankaŭ mi, kvankam mi loĝis ĉe la rando de urbo, daŭre havis iun boateton, komencante per kanoto kiam mi estis knabo. En Holando ĉiu lernejano devas lerni naĝi. Dum en la elementa lernejo mi lernis ankaŭ kiel savi dronantojn, kaj ŝildeto apud mia leterkesto indikis, ke oni povas uzi min en dronokazo. Post la kanoto mia patro konstruis por mi kvinmetran velŝipeton kun masto por velo. Kelkajn jarojn poste, kiam mi estis interaĝulo, li konstruis por mi pli larĝan kvinmetran velŝipeton en kiu mi povis dormi. Nelonge post tio mia patro aĉetis kvin metran ŝipeton kun tegmento, necesejo, kvar litoj, kaj eksterŝipa motoro kaj flugiloj. En ĝi miaj gepatroj kaj fratino kaj mi iam vojaĝis kaj vizitis S.A.T.-kongreson en alia parto de Holando. Fine li aĉetis grandan fiŝkaptboaton, por vojaĝi ĉirkaŭe en la Zuiderzee ("Suda Maro", nun "IJsselmeer"). Li pagis sufiĉe multe, sed oni trompis lin ne dirante ke nur ekzamenitaj ŝipestroj rajtas konduki tiajn boatojn. Do li perdis multan monon retrovendi ĝin.

Kelkajn jarojn post mia naskiĝo, kaj ĝis venis Hitler, junaj geknaboj havis la kutimon, certmaniere festi la tempon de la maturiĝo de la ĉerizoj. Pluraj ekhavis ŝuskatoleton kaj konstruis en ĝi iun pejzaĝon tiel ke oni povis vidi ĝin se oni rigardis tra truo, fenestro, eltranĉita el unu el la mallongaj flankoj de la ŝuskatoleto. Anstataŭ uzi la originan kovrilon, oni surmetis kovrilon de netravidebla sed traluma materialo. Oni povis vidi la pejzaĝon nur tra la farita flanka truo. Kun tia skatoleto infanoj, kaj ankaŭ mi, iris al aliaj infanoj kaj plenkreskuloj kantante "Por du (aŭ pli) ĉerizokernoj (*pips*) vi rajtas vidi ion, ion tre belan, en skatolo". La alfrontita persono pagis per la ĉerizkernoj (kiujn la homoj tiam kutime portis en la poŝo, por la okazo), kaj rigardis. La kerno ne havis valoron, escepte nur por la rikoltotempo de la ĉerizoj.
*Marcel Leereveld.*



**3ZZZ** … En la elsendo de la 7a de marto eblas aŭdi Marcel legi eltiraĵon de la historio de sia vivo .
Krom tio, pro tio ke la 8a de marto estas la internacia tago de la virinoj ĝi enhavas informojn pri Lidja Zamenhoj kaj kantas virinoj : Joelle Rabu, Anjo Amika kaj Moriza …

*Franciska Toubale*